



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, la 18-a de Oktobro 2021

Ĉeestantoj: Jehoŝua Tilleman, Dror Gaon, Avigail Meŝulam, Ŝlomo Ŝaĥar, Amri Wandel, Gabi Zeevi. **Gasto:** Nava Bilicki.

Protokolo de la pasinta (septembra) kunsido estis sendita al la estraranoj kaj enretigota.

La Estraro esprimas sian dankon kaj estimon al Ŝlomo pro la granda laboro kiun li faris, post kiu ELI ricevis de la Registristo la Konfirmon pri Bonorda Administrado. Samtempe ni gratulas lin pro la apero de lia unua libro kun mallongaj noveloj.

1. Raportoj

- a) **Jehoŝua:** nova adeptino kiu volas lerni E-on, menciis ke ŝi trovis retejon reklamantan lerni Esperanton dum 12 tagoj.
- b) **Amri:** letero de UEA pri “kanutigo” de kelkaj niaj membroj, kiuj ne renovigis siajn membrecojn.
- c) **Jehoŝua:** ĉu, malgraŭ la ĉi-jara Konfirmo pri Bonorda Administrado, du estraranoj devus viziti la Registristan Oficejon por persone kontakti kaj konatigi nian Societon – aŭ, pli bone, “ne vekti la urson”?
- ĉ) **Amri** petis de la redaktoroj de Esperanto rezervi lokon por la Israela Kongreso kaj lastmomente sendis raporton, kiu aperos en la novembra n-ro.

2. La 21-a kaj la 22-a Israelaj Kongresoj (Amri, Jehoŝua)

- a) **Amri:** ni intencas ricevi nian plupagon pri la 21-a IK al **Bnej-Dan**. Ili repagis laŭ sia kalkulo 1,037 NIS, laŭ ni ili devus repagi 2,800 NIS – la diferencon ni celas ricevi. Eblas agi en du direktoj: (1) La Aŭtoritato pri Protekto de Konsumantoj havas advokatojn, kaj ili agos, se ili vidos ŝancon por sukcesi; (2) La Aŭtoritato pri Hoteloj – Amri havas tie personan kontakton. Se **Bnej-Dan** volas gardi sian prestiĝon – ili pagos.
- b) La eblaj datoj por la 22-a IK (la nomo restu, pro allogi la eksterlandanojn!): 31/3, 1-2/4, aŭ 7-9/4/2022. Nava esploros ĉe **Miškenot Ruth Daniel** en Jafo, aŭ ĉe **Avraham Hostel** en Tel Avivo. Ni rezervos 20 ĉambrojn.

3. La estonta kunvenejo (Jehoŝua, Amri)

- a) **Jehoŝua** faris telefonan sondadon: 6 por **Alon-Turo**, por 3 estas egale, 16 por **Bejt-WIZO**. 2 ankoraŭ ne respondis. Ambaŭ lokoj havas siajn plusojn kaj minusojn.
- b) **Amri:** tiu sondado ne donas realan bildon, ĉar: (1) ĉ. duono de la sonditoj voĉdonis, kvankam ili tute ne konas la kunvenejon en **Alon-Turo**; (2) ĉ. duono (ne la sama duono) jam de jaroj tute ne aŭ apenaŭ venas al la klubo. Pro tio, oni ne povas decidi laŭ la nuna sondo, sed devas atendi ĝis pliaj membroj havos la okazon kunveni en la nova loko, kaj tiam sondi nur inter la membroj kiuj (i) almenaŭ unu fojon partoprenis kunvenon en **Alon-Turo**, (ii) partoprenas kunvenojn almenaŭ kelkfoje jare.
- c) **Amri:** la ĉefaj avantaĝoj de **Alon-Turo** estas ĝia allogeco, senpageco, retkonekto, ebleco uzi pli ol unufoje semajne (ev-e por kurso) kaj paralele du spacojn - kunvenejon kaj oficejon

.../2



– 2 –

(punkto 4), publika transporto (proksimeco de la trajno), libera teo/kafo en la apuda kuirejeto. Ĝia sola malavantaĝo estas la relativa malgrandeco (la kunveno sufiĉas por ĉ. 13 personoj, sed pliaj povus aldoniĝi en la enirejo aŭ eĉ en la apudaj kuirejeto kaj oficejo).

La avantaĝoj de **Bejt-WIZO** estas ĝia grandeco kaj la senpaga parkado (ambaŭ ne tre signifaj, ĉar tre malofte en la lastaj jaroj estis en la klubo pli ol 13 personoj, kaj apenaŭ iu venas per propra aŭto (krom 3 estraranoj okaze de kunsidoj, kaj tiam la parkadkosto estas repagata; cetere por Alon eĉ ili uzus la trajnon). La malavantaĝoj de WIZO: ne alloga por junuloj (maljunulejo!), kostas 280 NIS ĉiufoje, neflekseblaj horoj nur unu foje semajne, ne estas retaliro.

ĉ) **Propono:** resti dume ĉe la nova sistemo – alternative kunveni en ambaŭ lokoj.

Decido: *akceptita unuanime!*

4. Oficejo (Amri)

De tempo al tempo Amri kontaktas la respondeculon pri luigado, Bar Vardi, al kiu li lasis ŝlosilon de la oficejo por ĝin ludoni por ni. Dufoje estis interesiĝantoj por 1,500 NIS monate, senrezulte. Lastatempe Amri rekontaktis la advokatinon Ĥagit Mor, kiu luadis la oficejon antaŭ nia aĉeto – ŝi rekonfirmis, ke ŝi intencas lui la oficejon por 2,000 NIS monate (krom VAT – kiel societo ni ne rajtas preni VAT). Ŝi ankaŭ akceptas, ke ni povu uzi la oficejon dum la vespero por niaj kunvenoj kaj ev-e por seĝoj, se mankos en la kunveno. (Amri jam lasis en la oficejo du seĝojn el la 12, kiujn li kunportis – vane – por la hodiaŭa kunveno).

5. Dratverejo (Jehoŝua, Amri)

a) **Jehoŝua:** la aferoj estas en ordo, sen problemoj. La domkomitatano Avraham vidis foje niajn iamajn luantojn – Marina kaj Dima – denove kune.

b) **Amri:** Lior Has sendas al mi la raportojn pri monataj pagoj. Ĉu iu vidis kiel aspektas la apartamento post la renovigoj far la patro de la luanto (refarbado, banĉambro)? **Jehoŝua:** ne, sed Avraham asertas, ke la novaj luantoj eniris kaj ili estas tre simpatiaj.

6. La Zamenhofa Vespero (Jehoŝua)

Jehoŝua: La granda salono en **Bejt-WIZO** estas mendita por la 14-a de Decembro, 17h00-21h00. Supozeble, Mikaelo pretos prizorgi la programon (li ne venis hodiaŭ pro sia nova laboro. Prezidos verŝajne Oded Gilad.

7. Israela Esperantisto (Jehoŝua)

Amri devos printigi novajn kovertojn, ĉar elĉerpiĝis. **Jehoŝua** helpas al Mikaelo trovi novajn taŭgajn foliojn por la etiketoj. **Amri:** temas pri A4 kun 3 kolumnoj kaj 8 linioj.

La venonta kunsido: lundon, la 8-an de Novembro 2021

Protokolis: Gabi Zeevi kun aldonoj de Amri